I first heard of Esperanto from my ninth grade English teacher while we were studying a lesson on artificial languages. I was so intrigued, I went to the public library and checked out a book on Esperanto. As I studied the language, I became more and more proficient and am now happily using the international language by reading and conversing with fellow Esperantists via the internet.

So why did I become interested in Esperanto? It certainly wasn't because I thought that there was a language problem, but for many other reasons. I was curious about how and why the language was created. I was intrigued by the growing body of Esperanto literature, both translated and original.

If Esperanto is going to grow in this country, the many different interests that people normally have in learning a language need to be recognized and addressed. Why do some people learn French, for example? Some may be interested in history, or art. Others may be planning a trip to a French-speaking country, other may be interested in teaching, trans-

lating, interpreting, or a career in international business. Others may be interested in literature, theater and movies. The point is, many different interests motivate the learning of a language. The Esperanto movement needs to capitalize on these interests and market the language accordingly.

The average American who doesn't see that there is a global language problem will need another reason to study Esperanto.

Jim VARRONE (Parma OH)

## LINGUISTIC SOCCER

FIFA said it is determined to keep politics out of the World Cup after a Croatian diplomat protested that a translator at a soccer news conference spoke with a Serb accent. The dispute erupted in Nantes on Saturday when a Croat diplomat interrupted a post-match interview with coach Miroslav Blažević. Officials insisted the interview continue with the same translator, angering the Croatian government representative. Despite their difference, Serbs and Croats easily can understand each other's tongue. FIFA insisted the Croats were wrong to interfere. "A FIFA press conference is not the place for a political intervention of this kind." spokesman Keith Cooper said. The translator was successfully carrying out her duties, and Blažević was happy with her performance, Cooper added. The translator was a Serb woman from Belgrade, now living in France, who volunteered her services. (*San Francisco Chronicle*, Jun 22 1998)

## ENGLISH IN THE WORLD

English is the most widely spoken language in history. More than half of English-speakers did not hear the language as babies and did not grow up speaking it as children – and this community of second-language speakers of English is growing more rapidly than that of native users.

English is also widely misspoken and miswritten. English may be the international language of travel, but the English-speaking traveler is often asked to chew on menu offerings like these: whores dover, white whine, cock and tail, soap of the day, buff steak, prostitute hams, hamburger, spaghetti fungus, dreaded veel cutlets, foul breast, muscles in sailor's sauce, hen fried with butler, prawns in spit, utmost of chicken with smashed pot, muchrooms, mashed potatoes, backed beans, raped carrots, cabitch, groin salad, lemon jews, and Turkey coffee.

English may be the international language of business, but a number of notices and notes, observed in various hotels and other establishments, suggest a veritable Tower of Babble... (Richard Lederer in *More Anguished English*, New York: Delacorte Press, 1993)

Speaking of food, here are the footnotes for "Recipe to prepare the famous VALENCIAN PAELLA delicious Typical spanish dish": *To codd this rice and in order to get a delicious dish, it is absolutely necessary that the paellera is of the kind called «LA BARRACA». In the case of not to have peas, tender beans, red pepper or tomatoes, these can be replaced for the suitable canned vegetal.*

The following items were taken from *Far East Economic Review* (18 Jun 1998).

Sign spotted at the M.P. Resort Hotel in Trang, Thailand:



Sign at Robinson's department store in Manila, Philippines: "Only fitting customers allowed in changing rooms."

Letter received by tenants in Beijing: "Dear Guests, in order to offer you a good environment, we, Beijing Yongzhuang Property Management Co., won't begin to clean the outside glass (about five days) until 20 May."

## ESPERANTO IN THE MEDIA

Did you know that Eskimos have seventeen words for 'snow'? That the first artificial language was created by the Polish Dr. Zamenhof in 1887 and named 'Esperanto' – his own word for hope? He foresaw a universal language as the hope for mankind!... (*The Avengers: Too many targets* by John Peel and Dave Rogers, Tor Books, 1998, pp-84-85)

"'Europanto' is a translator's goulash of languages, but fans of Esperanto don't care for the flavor". That's according to Reuter and *The Sun*, Apr 26, p. 20A.

According to *Servas International Newsletter*, Spring 1998, in a report about the 1997 European Servas Summer University, "We also organized Esperanto lessons which were very much appreciated (50% of the participants attended them) and very efficient, thanks to François Randin, a Swiss Servas host and a very good

teacher. Many people were able to speak some Esperanto after a 6-day course. The President of the Czech Esperanto Association came especially from Praha to spend one day with the group..."

ELNA member Ronald J Glossop (Jennings MO) mentions Esperanto in a brief article about *Learning a Second Language* published in the Spring/ Summer issue of *Global Visions* (Vol. 5, Nr. 1).

ELNA member Arland R Meade (Bartow FL) published a letter about Esperanto in *The Polk County Democrat* (Jun 29, 1998), under the title "Esperanto Spoken Here".

Slava Fetisov and Anders Eriksson have been paired on defense for much of the [NHL] playoffs. Fetisov is Russian; Eriksson is Swedish. It would be understandable if either would lapse into their native language during quick plays or crucial moments. But it doesn't happen, Fetisov said. "We speak Esperanto," Fetisov said. "You know what that is?" Esperanto is an artificial international language based on basic words common to European languages. "It's weird because in Sweden we don't say 'to reverse the puck,'" Eriksson said. "We just say 'send it the other way.'" Don't worry. Slava and I do fine." (*Detroit News*, Jun 7, 1998)

The first in a series of Esperanto ads to be published by *Transitions Abroad* (Amherst MA) has appeared in this magazine's July-August 1998 issue.

Adiaŭon al Horace B Hand (Jamesville NY) kaj Richard Mullins (Decatur GA), kiuj forpasis antaŭ nelonge.

## LOKE KAJ REGIONE

Okaze de la ĉi-jara Internacia Semajno de Amikeco, la urbestro de Chicago IL gratulis la lokan E-klubon kaj ĝiajn membrojn.

Kvar esperantistoj informis pri Esperanto dum tuttaga Internacia Foiro de la publikaj lernejoj en Durham NC, la 4an de aprilo ĉi-jara. Oni elmontris Esperantajn librojn, periodaĵojn kaj kompakt-diskojn, kaj oni disdonis pri-Esperantajn flugfoliojn.

Spite al *el Niño*, kiu kulpas pri ĉio okazanta en nia parto de la mondo, la 30an Tut-Kalifornian Esperanto-Konferencon partoprenis 30 usonaj geesperantistoj kaj honora gasto el Rusio. Kiel kutime, la etoso estis ĝuinda. Gratulojn al la organizinto – la Esperanto-Rondeto de Santa Barbara.

Membroj de la Esperanto-Societo de la Karolinoj kaj Virginio kunvenis de la 22a ĝis la 24a de majo en Bowling Rock NC okaze de Printempa Esperanto-Renkontiĝo. Okazis prelegoj pri diabeto kaj kurac-plantoj. Ludiĝis muziko kaj spektaklis filmoj kaj Esperantaj videokursoj.

"La jaro de la oceanoj" estis la temo de la Nord-Okcidenta Esperanto-Kunveno okazinta inter la 29a kaj 31a de majo ĉi-jare en Olympia WA. Partoprenis ĉirkaŭ 30 personoj el la usonaj pacifikaj ŝtatoj kaj el la kanada provinco Brita Kolumbio.

La ĉi-jara NAKE, okazinta en Montréal, Kanado, inter la 25a kaj 27a de julio montriĝis tre sukcesa: ĝin partoprenis 111 personoj.

Nun, post kiam finiĝis NAKE, estas jam tempo prepariĝi por TAKE. La 4a Tut-Amerika Kongreso de Esperanto okazos de la 27a de januaro ĝis la 3a de februaro 1999 en Bogotá, Kolombio. Por pliaj informoj, bonvolu kontakti la organizantojn: Apartado Postal 54800, Santafé de Bogotá, Kolombio.



## SOLUTION TO ISOLATION

**Problem:** You want to learn Esperanto, but there is no one near you who can help.

**Solution:** Enroll in our Level 1 Esperanto correspondence course!

All you need is some spare time and a tape-player. You will receive the 12-lesson textbook, a tape of its conversations, and a workbook. A qualified instructor will guide you, and you can proceed at your own pace. When you complete the course, you will be rewarded with an official certificate.

**Follow-up:** If you're serious about learning Esperanto, you'll want to enroll in Level 2, the 13 lessons of which introduce all the rest of the grammar, and more vocabulary, using the same format as Level 1.

**Advanced:** Se vi jam scias la bazan gramatikon de Esperanto sed volas plibonigi vian lertecon kaj informiĝi pri la historio de Esperanto, aliĝu al Nivelo 3 kaj poste al 4.

Cost (based on length of textbook; Californians add local sales tax):  
Level 1 – \$38.50; Level 2 – \$42.00;  
Level 3 – \$51.50; Level 4 – \$32.00.

Dorothy HOLLAND (Santa Barbara CA)

ELNA offers also a free Esperanto postal course in 10 lessons. If you are interested, please drop us a line and a SASE, and we'll send you the first lesson.

An e-mail version of the free course is available at: <http://www.iki.fi/pacujo/esperanto/course/>

## GRAMATIK(L)E

Leganto demandis nin, kiu estas la diferenco inter "Vidite, la hundo forkuris" kaj "Vidita, la hundo forkuris". Malfeliĉe ni ne sukcesis trovi fakulon pri hundoj, sekve ni turnis nin al Avo kaj al liaj *Laŭ-okazaj lingvaj notoj* (London: Brita Esperanto-Asocio, 1977). Jen do, kion instruas al ni Avo:

Adverba participo devas ĉiam rilati al la subjekto de la propozicio:

*Enirante* la teatron, *li* ekvidis sian amikon (= *dum li eniris* la teatron, *li* vidis sian amikon).

*Trafinte* la aŭtobuzon, *ŝi* sidigis kontenta sur la benkon (= *ĉar ŝi trafis* la aŭtobuson, *ŝi* sidigis kontenta sur la benkon).

*Komenconte* la laboron, *li* ekbruligis sian pipon (= *antaŭ ol li komencis* la laboron, *li* ekbruligis sian pipon).

La jenajn ekzemplojn de misuzitaj participoj mi lastatempe trovis:

*Sidante* en la nekonata ĉambro, *stranga sento* kaptis min.

*Ricevinte* la filmon nun plaĉus al BEA ricevi la monsumojn...

La unuan oni povas tre simple korekti:

*Dum mi sidis* en la nekonata ĉambro, *stranga sento* kaptis min.

La dua esta malbona gramatike kaj stile; ne troviĝas subjekto, al kiu la participo *ricevinte* povus rilati, kaj la signifo estas tute neklara. Supozeble oni volis skribi:

*Ricevinte* la filmon, *BEA* nun tre volonte ricevus la monsumojn...

Ĉi-supre mi pritraktis nur aktivajn participojn, sed la samaj reguloj validas ankaŭ por la pasivaj *ate, ite, ote*.

\*\*\*

En artikolo en *HV* (*Hungara Vivo*), Botos tute prave korektas la frazon: *Adiaŭinte la sovhozon jam pli rapide ŝanĝiĝas la pejzaĝo*, klarigante kial ĝi estas malĝusta, kaj proponante diversajn alternativojn, el kiuj la plej taŭga – ĉar plej proksima laŭsence al

la originalo – estas: *Post kiam ni adiaŭis la sovhozon...*

\*\*\*

Ofte oni trovas tiun ĉi evidente malĝustan formon: *Mi ricevis de amiko leteron, dirante, ke li bedaŭras sian foreston*. Jen du manieroj ĝuste esprimi la penson:

Mi ricevis de amiko leteron, dirantan (sciigantan) ke li bedaŭras sian foreston.

Mi ricevis de amiko leteron, per kiu li esprimis bedaŭron pro sia foresto.

Oni ĉiam rememoru, ke en Esperanto adverba participo rilatas per la finitiva verbo al la subjekto de la propozicio. En la erara frazo unue citita, la finitiva verbo estas *ricevis*, kaj ties subjekto – *mi*. Komparu: Legante lian leteron, mi antaŭvidis lian foreston, en kiu frazo *legante* rilatas – pere de la finitiva verbo *antaŭvidis* – al la subjekto *mi*.

\*\*\*

L. L. Zamenhof skribis en *Lingva Respondo* en la jaro 1906: 'adverba participo povas esti uzata nur tiam, kiam ĝi rilatas al la subjekto de la frazo'.

\*\*\*

En *HV*, en recenzo pri *Esperanto en perspektivo*, oni legas: *Ili laboris helpataj de...* En Esperanto la adjektiva participo kvalifikas substantivon, sed ĉi tie necesas uzi la adverban participon *helpate*, ĉar ĝi rilatas al la ago, ne al la agantoj. Adjektivan participon oni ĝuste uzas en tiaj frazoj, kiel: *terura estas tiu alta pinto, pendanta* (= kiu pendas) *super la ondoj*; *korniko vundita* (= kiu estas vundita) *propran voston timas*. Adverban participon oni uzas tiel: *povante* (=kvankam li povis) *ripozi*, *li preferis labori*; *nevidate* (= kiam oni min ne vidas, kiam mi ne estas vidata) *mi enflugas en la domojn de la homoj*.

## RECENZE

*Tri ursoj, La. Adaptis Hanna HUTCHINSON. Tradukis David CROWELL. Ilustris Edward NOFZIGER. Cincinnati: Another Language Press, 1995. 24p. 175x210. Broŝurita. ISBN 0-922852-4005. Ĉe ELNA: kodo: TRI007; prezo: \$3.10*

Jen rakonto, kiun ni ĉiuj konas kaj ŝatas ekde nia propra infanaĝo. La ursa familio loĝas en la arbaro. Paĉjo urso havas grandegajn bovlon, kuleron, seĝon kaj liton, panjo urso havas mez-grandajn bovlon, kuleron, seĝon kaj liton, kaj la beba urso havas siajn etajn aĵojn. Foje, kiam la ursa familio iras promeni por ke la kaĉo malvarmiĝu, impertinenta blondulineto eniras la domon kaj malordigas ĉion, speciale la aĵojn de la urseto. La familio revenas kaj trovas la haoson, inkluzive malplenan bovleton, rompitan seĝeton kaj dormantan knabinon. Ŝi vekiĝas kaj eskapas tra la fenestro. La familio reiras al la privata arbara vivo, kaj la blondulineto neniam, neniam, neniam revenas.

Plene da ripetataj frazoj, plene da triopoj en tri grandecoj: egaj, mezaj kaj etaj: kia oportuno utiligi la brilan sistemon de Esperantaj afiksoj! La tradukinto nek unu fojon faris tion. Kie ni legas “unu granda lito”, kial ne emfazi la grandecon per “litego” aŭ “ege granda lito”? Kie ni legas “unu malgranda seĝo”, kial ne emfazi la malgrandecon per “seĝeto” aŭ “eta seĝo”? La tradukanto povintus tiel ludi kun la lingvaĵo kaj inspiri la leganton. La ripetado de “unu granda...”, “unu mezgranda...” kaj “unu malgranda...” ege pezas, pro abundo de silaboj.

Kiam la knabino (kial ne nomi ŝin “blondulineto” aŭ “knabineto”?) sidas kaj rompas la seĝon, la tradukinto uzas komplikajn verbojn anstataŭ simplajn: ŝi “sidiĝas” anstataŭ

simple “ŝi sidas” kaj “la seĝo rompiĝas” anstataŭ simple “ŝi rompas la seĝon”. “Ŝi kuŝiĝas” anstataŭ “ŝi kuŝas”. Denove komplikeco kie simpla eco sufiĉas.



La tradukinto elektis kelkajn malĝustajn vortoj: por iloj, ekzemple, la bildo montras bovlon, la teksto diras “telero-n”; la knabino diras “ho-ho!” kie vera Esperanta impertinentulino dirus “ho-ve!” dum ŝi forkuras.

La libro kaj la rakonto havas multajn eblecojn. Kiel lernilo, la ripetemo re-emfazas la lingvan sperton; la bildoj estas klaraj kaj simplaj, la rakonto povas antaŭeniri senvorte simple per la bildoj. La nova studento povus rakonti per la propraj vortoj. Por novaj esperantistoj, jen konata rakonto, je kies fino oni certe parkerigos kelkajn ilojn kaj afiksojn. Por pli spertaj studentoj, aŭ denaskaj infanoj kaj iliaj gepatroj, jen ebleco re-traduki kiel ekzercio al pli interesa kaj ludema lingvaĵo.

Sume, la traduko estas plata kaj iomete teda, pro elekto de samaj, neimagkreaĵ, mult-silabaj frazoj. Kvankam grava kvalito de la folkloro ĝenero estas ripetemo, la frazoj estu spicaj kaj riĉaj, uzante la latentajn humurajn lertaĵojn de la lingvo. La libro bedaŭrinde restas en konata, komforta teritorio, kaj neniam aventuras al pli lerta nivelo.

Michele GREGORY (Asheville NC)

*Lasta floro, La. James THURBER. Tradukis Liland B ROS'. Berkeley: Eldonejo Bero 1996. 31p. 175x105. Broŝurita. Ĉe ELNA: kodo: LAS006; prezo: \$1.80*

Ĉu libreto apenaŭ 11x18-centimetro, 31-paĝa meritas recenzon? Kvankam ĝi enhavas nur 250 vortojn kaj proksimume 50 amuzajn desegnaĵojn, ĝia mesaĝo estas klara. Tial mi recenzas ĝin.

Antaŭ 50 jaroj, James Thurber estis inter la plej ŝatataj humoristoj en Usono, kaj tia li ankoraŭ restas por multaj el ni. Li verkis ŝajne najvajn historiojn pri senkuraĝaj mezaĝuloj kaj (eble pro sia miopeco) ŝajne infanecajn skeĉojn pri dormemaj hundoj. Tiu ĉi libreto temas pri milito, detruo, espero, rekresko, reprosperiĝo, denova milito, denova detruo, denovaj espero kaj rekresko. La mesaĝo estas klara: militoj estas terure malbonegaj aferoj. Ĉiuj, ĉie, konsciuj pri tio. Tial tion Thurber klarigas; tial Ros' tradukis ĝin en Esperanton.

Nur bagatelan kritikon mi menciuj. Laŭ la tradukinto “Viroj... fariĝis pli malaltaj ol basaj bestoj”, kvankam mi supozas ke Thurber intencis “mizeraj” ne “malaltaj”.

Ralph A LEWIN (La Jolla CA)

Haveblas el la Libroservo de ELNA alia verko de James Thurber: *La 13 horloĝoj* – 42-paĝa rakonto esperantigita de Ralph A Lewin kaj ilustrita de Ronald Searle. Kodo: DEK006; prezo: \$4.00

If you want to receive a copy of our complete book catalog, please send \$2.00 to ELNA (see address on the back cover).

## ADRESARO POR RETANOJ

Mi ne certas, kiam la unua esperant-ajo aperis en la (tiam tute usona) reto. Sed jam en la okdekaj jaroj la reto transsaltis naciajn limojn, kaj Esperanto komencis funkcii sufiĉe vastaskale en ĝi. Ekzistis poŝtolisto por esperantistoj, laŭ mia propra sperto, almenaŭ en 1991, kaj samtempe afiŝejo. Kaj, kompreneble, la esperantistoj jam ekde ĝia komenco komunikis per retpoŝto.

En februaro 1993, nederlanda retspertulo, Derk EDERVEEN, elpensis starigon de retadresaro por esperantistoj. Tiu unua adresaro, arĥivita por legado fare de la esperantistoj en la tiama sola konservejo de esperantaĵoj en la reto ĉe la Tehnika Universitato de Eindhoven, Nederlando, kunmetis 310 retadresojn de 219 unuopaj personoj en 26 landoj. Tiuj personoj inter si reprezentis 67 landajn kaj lokajn Esperantajn organizojn aŭ revuojn, kaj 18 internaciajn.

La afero kreskas kun la reto, kompreneble. Jam komence de la nuna julio tiu listo, ĉiumonate ĝisdatigata, enhavas 2081 retadresojn de 1522 unuopaj esperantistoj en 70 landoj; inter si, ili reprezentas 381 landajn kaj lokajn Esperantajn organizojn aŭ revuojn kaj 69 internaciajn. Cetere, s-ro EDERVEEN intertempe komencis kolekti la adresojn de TTT-paĝoj por unuopuloj kaj grupoj, kaj nun troviĝas 415 tiaj en la listo.

Se vi ne povas uzi TTT, sendu aliĝmesaĝon al [lidge@wxs.nl](mailto:lidge@wxs.nl). La mesaĝo devas esti laŭ la jena formato (vi havas du retadresojn, estas prezidanto de nacia organizo ENUO, kaj peranto por internacia organizo ENUD):

### ALDONO

- Lando (.ln)  
\_+ Nomo FAMIL'IA  
([nomo@adreso.com](mailto:nomo@adreso.com)) (rimarko)  
\_++Nomo FAMIL'IA  
(<http://www.adreso.com/pub/u/~nomo/hejmpagxo.html>)  
ENUO (Ekzempla Nacia Umanta Organizo):  
prezidanto: Nomo FAMIL'IA  
- ENUI (Ekzempla Novajagentejo Umanta Internacie):  
peranto: Nomo FAMIL'IA (.ln)

Simpla ekzemplo:

### ALDONO

- Usono (.us)  
+ Don HARLOW  
([don@donh.vip.best.com](mailto:don@donh.vip.best.com))  
++ Don HARLOW  
([donh@esperanto.org](mailto:donh@esperanto.org))  
++ Don HARLOW  
(<http://www.best.com/~donh/>)  
NKPEB (Nord-Kalifornia [Privata] Esperanto-Bulteno):  
unusola funkciulo: Don HARLOW

Rimarku: la kutimo en la listo estas majuskligi [nur] la FAMILIAN NOMON.

### Glosaro:

reto = (kutima mallongigo de) Interreto ("the Internet")  
afiŝejo = (pli kutime) novaĵgrupo ("[Usenet] newsgroup")  
retpoŝto = "e-mail"  
poŝtolisto = "mailing list"  
TTT = Tut-Tera Teksaĵo ("World Wide Web")

Don HARLOW (Pinole CA)

## LETERU

Ĉu vi serĉas E-korespondojn en la tuta mondo? *Koresponda Servo Mondskala* povus helpi vin. Por ricevi detalojn sendu unu internacian respondkuponon al: François Xavier GILBERT, B.P. 6, FR-55000 Longeville-en-Bois, Francio.

Asghar SAJADIAN, Pfeilgasse 3a/642, AT-1080 Wien, Aŭstrio, 33-jara iranano, studento pri psikologio, serĉas korespond-amikinojn.

Jorge PACHECO, Rua Japura 399 c/1 JPA, BR-21320-000 Rio de Janeiro - RJ, Brazilo, serĉas korespondantojn en Usono.

Jan MATYAS, J. Hory 4, CZ-73601 Haviřov, Ĉeĥio, serĉas korespondantojn en Usono.

Jeffrey LI, 1403 Hing Kok House, Kwai Hing Estate, Kwai Chung, Hong Kong, Ĉinio, komencanto deziras korespondi por plibonigisian Esperanton.

Hans Joachim KRIEG, Posaer-Str. 33, DE-06712 Zeitz, Germanio, serĉas kontaktojn kun usonaj geesperantistoj; havas diversajn hobiajn.

Amikara Rondo Esperantista, Petőfi Sándor ut. 3, HU-2921 Komárom-Szöny, Hungario, serĉas kontaktojn en la tuta mondo.

Pero BILČIĆ, Bijankinijeva 5, HR-21000 Split, Kroatio, 20-jara studento ŝatus korespondi kun samaĝuloj; hobiaj: muziko, komputiloj, sporto, libroj, historio

A. ĜIGĜIDDORĜ, PO Box 1117, C.P. 13, MN-210613 Ulaanbaatar, Mongolio, ŝatus korespondi kun usonanoj.

Vladislav ANISIMOV, ul. Lenina 116/54, RU-399340 Usman, Rusio, serĉas korespondantojn en Usono.

Landing BADIANE, H.L.M. Fass n° 135, Dakar, Senegalio, 31-jara elektronikisto serĉas korespondant(in)on en Usono.

La aktuala listo estas akirebla ĉe:

<http://home.wxs.nl/~lidge/esperanto-adresaro.txt>  
<http://home.wxs.nl/~lidge/esperanto-adresaro.html>  
[http://home.wxs.nl/~lidge/esperanto-adresaro\\_txt.zip](http://home.wxs.nl/~lidge/esperanto-adresaro_txt.zip)  
[http://home.wxs.nl/~lidge/esperanto-adresaro\\_html.zip](http://home.wxs.nl/~lidge/esperanto-adresaro_html.zip)  
<http://www.esperanto-usa.org/esp-adresaro.txt>  
<http://www.esperanto-usa.org/esp-adresaro.html>  
<http://esperanto.agoranet.be/esperanto-adresaro.html>  
<ftp://ftp.agoranet.be/esperanto/esperanto-adresaro.txt>

Se vi volas aliĝi al la listo kaj povas uzi TTT-on, vi povas tion plej facile fari per la formularo ĉe:

<http://www.cs.chalmers.se/~martinw/esperanto/aligxo/>

**KOTIZOJ POR  
ESPERANTO-LIGO POR NORDA AMERIKO  
(ELNA)**

Individua membro	\$30.00
Juna membro (maksimume 27-jara)	\$15.00
Membro kun limigita enspezo	\$15.00
Familia membreco	\$45.00
Subtena membro	\$60.00
Patrona membro	\$90.00
Dumviva membro	\$600.00

Membroj de ELNA, sendepende de la kategorio, ricevas ĉiujare la jenajn: *Esperanto USA* (6 numeroj); *ELNA Update* (4 numeroj); Membrolisto + suplemento (po 1); Librokatalogo (1).

Amiko de Esperanto (nemembro) \$10.00

Amikoj de Esperanto ricevas ĉiujare la jenajn: *ELNA Update* (4 numeroj); Librolisto (1).

**KOTIZOJ POR  
UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO  
(UEA)**

Membro kun <i>Gvidlibro</i>	\$10.00
(ricevas la <i>Gvidlibron tra la Esperanto-movado</i> )	
Membro kun <i>Jarlibro</i>	\$24.00
(ricevas la <i>Jarlibron de UEA</i> )	
Membro-abonanto	\$60.00
(ricevas la <i>Jarlibron de UEA</i> kaj la revuon <i>Esperanto</i> - 11 numerojn jare)	
Dumviva membro	\$1500.00
(ricevas dumvive la samon kiel Membro-abonantoj)	
Membroj en la kategorioj: Membro kun <i>Jarlibro</i> , Membro-abonanto kaj Dumviva membro ricevas ankaŭ la revuon <i>Kontakto</i> , se ili estas 30-jaraj aŭ pli junaj.	
Societo Zamenhof	\$120.00
Patrono de TEJO	\$72.00
(ricevas la revuon <i>Kontakto</i> - 6 numerojn jare kaj aliajn eldonaĵojn de TEJO)	

Ĉiuj membrecoj estas por la kalendara jaro; la menciitaj kotizoj validas por 1998.

Oni povas pagi por UEA-membrecoj pere de ELNA (vidu la adreson ĉi-sube), sed ĉiuj UEA-materialoj sendiĝos rekte el Nederlando. Tiuj, kiuj volas membriĝi en UEA rekte, povas fari tion kontaktante la Universalan Esperanto-Asociacion ĉe: U.E.A., Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando.

Por ricevi aliĝilon por ELNA kaj UEA, kun kompleta listo de E-periodaĵoj aboneblaj pere de ELNA, bonvolu sendi adresitan kaj afrankitan koveron al la adreso de ELNA.

Esperanto League for North America  
PO Box 1129  
El Cerrito CA 94530

Non-Profit Org.  
U.S. Postage  
PAID  
Permit #1040  
Leesburg, FL 34748